

BOULOGNE SUR MER
31, BOULEVARD MARIETTE

11^{an} de Sept. 1930

Kara Amiko

Mi retralegis vian de la 19 de la pasinta kiun mi en Cauterets ricevis. Tiu letero tre plaĉis al mi + mi tre bedaŭras ke vi ne skribas pli ofte + pli regule. Ni povus trakti temojn interesajn - ni konas unu la alian de ... baldaŭ 10 jaroj + oni ne facile rekomencas novajn amikecojn kiam oni ne estas juna. Sed, vi ne povas, aŭ ne volas, + cirkonstancoj vin malhelpas !!!! Kontraŭ ... la sorto oni nenion povas.

Mi revenis de Cauterets fino de Augusto je terura varmego+ restadis en Parizo je ankoraŭ pli terura varmego + mi estis senforta + malfeliĉa. Nune, estas griza ne varma vetero.

En Cauterets mi estis tre laca pro la komplikata akva kuracado, sed nune mi estas tre bona, sed estas nur vintre ke oni povas scii ĉu la kuracado estis efika. Sendube ke mi reiros la proksiman jaron.

Ĉu neniam vi venos Francujon? Ne atendu tro longe. Vi ne plu ŝatus se vi estus tro maljuna.

Belan rondiradon vi faris aŭtomobile. Dreseno efektive estas tre bela + tiel pura.

Salzburgon mi bonege konas. Kelkajn tagojn mi pasigis tie kun D^{ro} Broder en 1924 en la hotelo Esp. "Wolf Dietrich" + S^{ron} Hinterhuber mi konas. Mi estis en Insbruck en 1912 kun Lucien + en 1924 tute sola - bela urbo ankaŭ.

"Meistersinger" mi ankaŭ jam vidis ("Les maîtres chanteurs" en Français).

La granda Tribunalo malfermiĝos la 1^{an} de Okt. Tamen, mia edzo estas en nokta tribunalo nuntempe kvankam estas la libertempo.

Esperante baldaŭan respondon, mi al vi donas manon + sendas plej korajn amikajn sentojn. Mi ja dankis vin por la afabla P.K. de Eveto, ĉu ne?

Dankon por interesa foteto de vi + de amikoj.

Acie Sergeant